



## **1-a de Novembro: Tutmonda Tago por Kobano**

Alvoko de la organizo pri Homaj Rajtoj EUTCC (EU Turkey Civic Commission) de la 14-a de oktobro 2014-a. Publikigita en la blogo “Rojava no esta sola” la 21-an de oktobro 2014-a:

**URĜA ALVOKO AL AGADO**  
**Tutmonda mobilizo kontraŭ la Islama Ŝtato.**  
**Por Kobano, por la Homaro.**  
**Mobiliz-tago: 1-a de Novembro 2014-a.**

La Islama Ŝtato lanĉis grandan militan kampanjon en diversaj frontoj kontraŭ la kurda regiono de Kobano en la nordo de Sirio. Tiu ĉi estas la tria atako de la IŜ kontraŭ Kobano ekde Marto 2014-a. Ĉar la IŜ malsukcesis la du antaŭajn fojojn ĝi atakas per grandaj fortoj kaj nepre volas konkeri Kobanon.

Januare de tiu ĉi jaro la kurdoj de Okcidenta Kurdio (Roĵavo) starigis lokajn administraciojn sub la formo de tri kantonoj. Unu el tiuj tri kantonoj estas Kobano. Norde situas la landlimo kun Turkio kaj je la aliaj tri flankoj ĝi estas ĉirkaŭita de teritorioj kontrolataj de la IŜ. La IŜ avancis je la limoj de Kobano danke al peza armilaro fabrikita en Usono. Centmiloj da civiluloj estas sub minaco de la plej brutala genocido en la moderna historio. La civitanoj de Kobano klopodas rezisti per bazaj armiloj kontraŭ la plej brutalaj atakoj de la IŜ kun la nura helpo de la Popolaj Protekt-Taĉmentoj de Okcidenta Kurdio, sed sen internacia helpo.

**Tial tutmonda mobilizo kontraŭ la IŜ, por Kobano, por la homaro, estas gravega.**

La tiel nomata internacia koalicio por lukti kontraŭ la IŜ ne helpis efektive la kurdan rezistadon eĉ se ĝi estis atestanto de la daŭra genocido kontraŭ Kobano. Iuj landoj de la koalicio, speciale Turkio, estas inter la apogantoj, finance kaj milite, de la teroristoj de la IŜ en Irako kaj Sirio.

**Tial tutmonda mobilizo kontraŭ la IŜ, por Kobano, por la homaro, estas gravega.**

Se la mondo volas demokration en Meza Oriento devas subteni la kurdan rezistadon en Kobano. La demokrata aŭtonomeco en Roĵavo promesas liberan estontecon por ĉiuj la popoloj de Sirio. Rilate tion ĉi la “Rojava Modelo”, la sekulara pozicio, ne sekteca, demokrata, estas tiu kiu praktikas la

unuecon kaj la diversecon.

**Agu nun.**

Estas la horo por doni al la tutmondaj ludantoj pravigojn por kredi alimaniere.  
Ni alvokas la homojn en la tuta mondo montri sian solidarecon kun Kobano. Eliru la stratojn kaj manifestaciui!

**Ni alvokas vin aliĝi al la tutmonda mobilizo por Kobano.**

**Subtenu la Rezistadon kontraŭ la IŜ, por Kobano, por la homaro!**



Komunikaĵo de la FEL(Federacio de Liberecanaj Studentoj) aperinta en la blogo “A las barricadas” la 29-an de Oktobro 2014-a:



### **LIBERECANA BLOKO SUBTENE AL LA KURDA REVOLUCIA REZISTADO**

*Per tiu ci komunikaĵo ni volas vidigi kaj surpreni kiel propra, el la anarĥiismo, la liberigadlukton de la kurda popolo kaj ties politikan orientiĝon konata kiel Demokrata Konfederaciismo.*

Ekde kiam antaŭ kelkaj jaroj komencis la tiel nomataj Arabaj Printempoj kaj pro la influo kiun havis tiuj movadoj sur la siria teritorio, oftas la militkronikoj kiuj alvenas el tiu mondparto. Delokitaj personoj, civila milito, mizero...estas la kutimaj vortoj por priskribi la situacion, sed oni apenaŭ parolas pri la politikaj agantoj implikitaj en tiuj kunteksto. El ĉiuj ĉi lastatempe elstaris amaskomunikile la kurdoj. Kiuj estas kaj kial ili batalas? La informo trafilita de la grandaj amaskomunikiloj ne donas motivon por pensi ke granda parto de la kurda popolo efektivas lukton pli for ol rezistado kontraŭ la islamisma fanatikismo, sed ke ĝi plenumas veran Socian Revolucion.


La kurda popolo estas unu el tiuj grandaj popoloj perforte dividitaj per la artefaritaj landlimoj de la diversaj Ŝtatoj kiuj dominas ties teritorion inter Sirio, Turkio, Irako kaj Irano. La historio de la kurda popolo estas tiu de ties rezistado kontraŭ la dominado efektivigita kontraŭ ĝi kiel popolo. Kun relativaj similecoj je la luktoj de okcidentsaharanoj, palestinanoj kaj zapatistoj, la kurda popolo per siaj politikaj organizaĵoj evoluigis tiun rezistadon kontraŭ la dominado ellaborante sian propran politikan, ekonomian kaj socian modelon, nomata Demokrata Konfederaciismo(DK).

La DK estas frukto de la ideologia evoluado de la PLK(Partio de la Laboristoj de Kurdio) elde la leninismo de la reala socialismo al la liberecana municipismo influata de la anarĥiisto Murray Bookchin. La DK estas propono de radikala rekta demokratio politike kaj komunuma ekonomie kaj

socie, socimodelo kontraŭhierarkia kiu ne batalas por starigi Kurdan Ŝtaton, kaj tiele subpreman socian klason, sed por starigo de la Konfederacio de Kurdaj Komunumoj, modelo de liberaj komunumoj konfederaciitaj. Tiu ĉi estas la socia modelo kiun la kurda popolo establas en la regiono de Roĵavo kaj Kobano, kaj tiu ĉi estas la modelo kiun el la anarĥiismo ni depostulas: de malsupre supren memorganizita socio, la konfederacio de liberaj municipoj, la negenerado de ŝtataj aparatoj nek sociaj klasoj subpremantaj kaj la komuna proprieto de la produktiloj. Socio libera kaj egaleca.

Pro ĉio ĉi ni alvokas la liberecanojn kaj revoluciulojn de Madrido subteni kaj montri la kurdan lukton kiel lukto por la Socia Revolucio, lukto por la libereco, kaj montri el la liberecana movado la tutan subtenon la solidarecon kiun ni kapablas transdoni al ĝi.

**Por la Demokrata Konfederaciismo en Kurdio.  
Kun la kurda revolucia rezistado.**



Esperantigis: Nikolas Xil Carvalho (SAT-matrikulo 34316). Novembro 2014-a.